


*The*  
NORTH AMERICAN  
ESPERANTO REVIEW



*4-7 Julio, 1957*

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Januaro - Februaro • 1957

731

## The North American Esperanto Review

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

*Addresses:* Subscriptions and bulk orders should be sent with payment to the Treasurer. Correspondence regarding circulation, including changes of address, etc., should be sent to the League Secretary. Send literary contributions, news items, announcements, etc. to the Editor: F. R. Carlson, 2116 North 35th St., Seattle 3, Washington.

*Deadlines:* The *Review* is placed in the mails about the fifteenth of every second month. Material for publication must be in the hands of the Editor no later than the fifteenth of the preceding month, except for last-minute news items, which will be accepted as late as possible.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *President:* John L. Lewine, 50 Overlook Terrace, New York 33, New York; *Vice-President:* James D. Sayers, RFD 2, Lillie, La.; *Secretary:* Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; *Treasurer:* Edward W. Pharo, Jr., 220 County Line Rd., Somerton 16, Pennsylvania.

*Membership Dues:* Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

*Members are asked to take careful note of the paragraph above entitled "Addresses" and to address all communications accordingly.*

*Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."*

## The North American Esperanto Review

(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

Vol. 5, No. 1.

Jan.-Feb., 1957.

The *Review* not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

*La Revuo ne nur permesas, sed invitas, represon, escepte kie aperas speciala noto limiga pri kopiado.*

### CONTENTS (English)

Our Fifth Congress . . . . .	Page 1
It's the Talk of the Town. . . . .	4
History . . . . .	5
Esperanto Vagabonds in Europe . . . .	6
Hey, Teacher! Read this! . . . . .	8
Here's the Idea . . . . .	9
Addresses* (See note below) . . . . .	11
Executive Board Decisions . . . . .	13
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto . . . . .	Inside Back Cover

### ENHAVO (Esperanta)

Fablo de la Saĝa Polipo . . . . .	Paĝo 2
Nia Literaturo . . . . .	3
Esperanto kaj Mallongaj Ondoĵoj . . . .	7
Hortabelo, Mallongaj Ondoĵoj . . . . .	10
Bonvolu Skribi (Korespondpetoj) . . . .	10
Adresoj*(Vidu noton sube) . . . . .	11
Esperanto en Norda Ameriko . . . . .	12
Trans la Lingvajn Barilojn . . . . .	14
Por Rimistoj . . . . .	16

\* Persons or groups listed are not necessarily affiliated with the League. We request, therefore, that inquiries concerning the *Review* or the national Esperanto movement be directed to the proper officials of the League, as listed above.

\* Ĉar ne ekzistas filia rilato inter lokaj grupoj kaj la landa asocio, ni petas ke oni sendu ĉiujn demandojn kaj komunikaĵojn rilate la tutlandan Esperantan movadon rekte al: Esperanto League for North America, Inc., RFD 1, Meadville, Pennsylvania, Usono.


# *The* NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 5

Jan.-Feb., 1957

No. 1

## Our Fifth Congress

 THE FIFTH ANNUAL CONGRESS of the Esperanto League for North America will be held in New York City, July 4 through 7, 1957. Details of program, etc., are not available as this issue of the *Review* is printed. For further information, write to the host club:

Esperanto Society of Greater New York, 767 United Nations Plaza, New York 1, N.Y.

This should be the greatest congress of Esperantists ever held in North America. Everyone, Esperantist or not, who supports the idea of an auxiliary international language, should help to make this Congress a great success and launch the drive to

### *Make America Esperanto-conscious*

If you can't attend the Congress, you can still help. Intensify your efforts in your local community. Build a live group ready to do its share in the great drive after the Congress. Recruit new students, new members for your local group and for the League. Try to send at least one member to represent your group at the Congress. Advertise Esperanto and the Esperanto Congress.

One very effective (and inexpensive) way to advertise both is to circulate the Congress stamps as widely as possible. The stamp, reproduced in black and white on the cover of this issue, is a beautiful three-color job. Buy them and put them on all envelopes, packages, wherever they will be seen.

The cost? Postpaid: 30 (minimum order) for 25¢; 150 for \$1.00; larger quantities at proportionate reductions. The price is set to cover expenses, with no profit. If there is a profit, it will be used for a bigger and better Congress. Order NOW from:

Ralph R. Bonesper, 461 West 44th St., 5-D, New York 36, N.Y.

OR

Esperanto League for North America, RFD 1, Meadville, Pa.

# Fablo de la Saĝa Polipo

**S**PONGO KRESKADIS SUR ROKO en la fundo de la maro. Proksime al ĝi estis polipo, ĝia amiko. Diris la spongo al la polipo, "Ĉirkaŭ vi kaj super vi kreskas aliaj polipoj. Baldaŭ vi estos kovrita de aliaj kaj vi iĝos ŝtono. Kion en via vivo vi intencas fari?"

Respondis la polipo, "Mi helpas konstrui grandan insulon."

La spongo ree parolis, "Vi malŝparas vian tempon. Vi neniam vidos insulon konstruita. Kial vi ne staras, kiel mi, en la malferma maro, kie vi estus libera inter ĉiuj el la vivaj estaĵoj de la akvo?"

"Ne," respondis la polipo, "Mi ne vidos la insulon kompletan, sed mi kontribuos mian parton al la giganta laboraĵo. Post

miloj da jaroj aperos granda insulo ĉe la supro de l' akvo. Belaj arboj kreskos kaj birdoj kantos inter la branĉoj. La vivlaboroj de mi kaj mia nombrega frataro daŭros por ĉiam. Sed, pri vi, iam, plejeble, oni tiros vin de via loko, sekigos vin, kaj iu viro uzos vian skeleton por lavi aŭtomobilojn ĝis ĝi estos eluzita. Vi poste estos ĵetita sur amason de aĉaĵo kaj vi estos neniam poste memorata."

MORALO: Li, kiu laboras por Esperanto, ne malŝparas sian tempon, sed faras sian parton al la konstruado de venonta interkomprenanta, paca kaj homamika mondo.

*Geo. E. Wagner*

## KOPIO

Dr. W. Drees,  
Beeklaan 502,  
Den Haag,  
Nederland.

Den Haag, 15 — 12 — '56

Al k-do Mark Starr,  
I.L.G.W.U.  
1710 Broadway  
N.Y. 19 U.S.A.


Kara kamarado Starr,

La ricevo de via letero de la 11a de Oktobro kun la gazeto-eltranĉaĵoj kaj la verkaĵo pri Esperanto faris al mi grandan plezuron. Per tio mi konstatis, ke vi restas aktiva kaj krom tio, ke vi daŭre interesas vin pri Nederlando.

Volonte mi kaptas la okazon esprimi al vi miajn bondezirojn rilate al Kristnasko kal Novjaro.

Kun afablaj salutoj,  
(subskribita) W. Drees

**Samideano Dr. W. Drees estas Ĉefministro de Nederlando.**



## Nia Literaturo

*Literatura Redaktoro: D. B. Richardson,  
3412 North Mullen, Tacoma 7, Washington*

(La libroj recenzitaj en ĉi tiu rubriko estas mendeblaj ĉe: Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.)

La tri novaj eldonaĵoj, kiuj venas al diskuto en la nuna numero, estas ĉiuj tradukoj. Du el ili reprezentas gravajn antaŭenpaŝojn por nia literaturo. Ili estas *Tartarin de Taraskono*, de la franco Alphonse Daudet, kaj *Ezopa Saĝo* en traduko de nia Esperantista literatura giganto, Kolomano Kalocsay.

*Tartarin* estas tre bone konata tra la mondo — ĉe en Usono ĝi estas aparte favorata studlibro por progresantaj kursoj en la franca lingvo, malgraŭ la fakto, ke ĝi plenplenas je la esprimoj, moroj, kaj la loknomoj de suda Francujo. Ĝuste en tiu regioneca karaktero, tiel majstre pentrita de Daudet, kuŝas la ĉefverkeco de tiu ĉi rakonto; kaj simile, tie kuŝas la malfacileco por la Esperanto-tradukintoj, Jean Delor kaj Paul le Brun. Ke ili sukcesis en tio estas pli evidenta al francelingvanoj; al la ceteraj Esperantistoj la verko kompreneble devas stari sur la propraj meritoj; kaj — se la leganto havas paciencon por plene profiti el la multaj notoj en la malantaŭo de la libro — li rericevos la plenan guston de la originalo.

La plaĉa vesto de la libro, eldonita de *Heroldo*, aldonas al ĝia valoro, kiel ankaŭ la 10 tutpaĝaj ilustraĵoj de Lucien Guezennec.

*Ezopa Saĝo* estas la unua verko de Kalocsay de post tre longa tempo, kaj estas kaŭzo por ĝojo inter la tre multaj Esperantistoj, kiuj rigardas al li kun plej granda estimo. Ne sen kaŭzo: la poezio brilas, kaj havas tiun nedifineblan kvaliton kiu distingas la verkon de vera majstro. Ke *Ezopa Saĝo* trovos lokon inter la listo de Esperantaj ĉefverkoj estas certe, kaj la libro estas varme rekomendata al ĉiu.

La verko konsistas el 77 famaj Ezopaj fabeloj “reverkitaj” en Esperantaj versoj plus Kaloĉajeska versforma priskribo pri Ezopo mem. La libron ornamas multnombraj vinjetoj, kaj ĝin eldonis la nova grupo “Komuna Konversacia Klubo”, Kopenhago, kiu jam donis al ni *Rozoj kaj Urtikoj*.

Parenteze, la *Koko*-eldonistoj promesas al ni en 1957 *Homoj kaj Riveroj*, novelaro de la premiita aŭtoro Johan Hammond Rosbach; kaj en 1958 originalan romanon de Ferenc Szilagyi: “Tiel Okazis”. Tri vivuojn al la Komuna Konversacia Klubo por ties altvaloraj aldonoj al nia literaturo!

La eldonantoj de la bonega literatura gazeto “Norda Prismo” donis al ni Esperantan tradukon de la “mondsukcesa” verko titolita “Scandinavians — that’s us!” Ĝi estas satira priskribo de la nordaj landoj kaj popoloj, riĉe ilustrita laŭ sama bonhumoro de Léon van Roy. Oni nur zorgu, legante “Ni en Skandinavio”, ne akcepti tro serioze ĉiujn asertojn de la aŭtoro, ĉar la faktoj kaj la humoraĵoj ne ĉiam klare distingigas por tiuj, kiuj ne havis ankoraŭ la bonan ŝancon mem persone konatiĝi kun la skandinavaj landoj.

La libreto estas modesta laŭ grandeco, sed ankaŭ laŭ prezo: do por malpeza legado ĝi estas “ĝuste la bileto” por plezuro.



(From reports in *Heroldo de Esperanto*,  
the newspaper of the Esperanto movement)

## in Leningrad, USSR.

**T**HE MOST STRIKING RECENT DEVELOPMENT in the Esperanto movement is the rebirth of interest in the international language in the USSR, where the Esperantists have been silent for twenty years.

In Leningrad, the newspaper *Smena* recently published an article about Esperanto. The local Esperanto group was immediately besieged by persons wanting to learn the international language.

First study groups organized were in the institutions of higher learning, five groups in Leningrad University alone. Altogether, by the middle of last November, some 800 persons were enrolled in Esperanto study groups in Leningrad. About the same number have to wait until teachers and teaching facilities become available.

As the international language was something one just didn't mention in polite society there in recent years, there were no textbooks available. The 800 students are being taught by handwritten, mimeographed or photocopied lessons.

The city government of Leningrad has arranged to publish the first postwar Esperanto grammar in the USSR, but reading material in Esperanto is badly needed. Send to: Georgo Teterin, Kirovski pr. 19, kv. 16, Leningrad 61, USSR.

## in Rio de Janeiro, Brazil

Legião de Boa Vontade (Legion of Good Will) recently announced a radio course in Esperanto. 1100 persons registered for the course, including one 73-year-old, who said that he wanted to learn the language so that he could teach it to his grandchildren.

The Legion of Good Will will soon have its own radio broadcast station, using Esperanto on both long and short wave.

The Brazilian Esperantists have an excellent printing and publishing plant, but anyone interested should write to: Legião de Boa Vontade, Esperanto-Departamento, Av. Rio Branco, 43, Rio de Janeiro.

## in Hanoi, Vietnam

It started with a public meeting in the Unity Clubhouse. The audience of more than 500 included intellectuals, leaders of official organs and national and city organizations, and high school students.

Write to: K-do Nguyen Van Kinh, Esperanto, 2 Ly Thuong Kiet, Hanoi.



Comment by Charles Chomette, Los Angeles, on "Questions and Answers" in the Review, October, 1956.

The first Esperanto book in English was not the R. H. Geoghegan grammar, but one published by Dr. Zamenhof himself. (I have an original copy of its *vortaro* to prove it.) However, because this book contained many mistakes in its English text, Geoghegan undertook to translate one of his own and Dr. Zamenhof destroyed the stock of his own book. (I am looking everywhere for a copy of this very rare *broŝuro*.)

There are four Americans listed alphabetically among the first thousand esperantists. They are:

Arnold, Henri J., Plainfield, Conn.

Lamberton, John P., 721 16th St., Philadelphia.

Orr, Adam C., Park Ridge, Illinois.

Phillips, Henry, secretary of the American Philosophical Society, 320 S 11 St., Philadelphia.

Any one of the four could have been

the first American Esperantist.

Henry Phillips translated the French edition of Dr. Zamenhof's grammar into English under the title "An Attempt toward an International Language by Dr. Esperanto". The book is dated 1889, but the preface is dated Sept. 17, 1888.

Geoghegan's grammar is also dated 1889 and it was passed by the Russian censor on January 5, 1889, therefore it may well be that Geoghegan's grammar was the third instead of the first Esperanto book in English, as you stated.

I would like also to take this opportunity to say that the first *broŝuro* in Russian was published in two editions and that the offset copy (now on sale) of the book is a copy of the second edition. The first edition did not contain the typographical errors found in the second edition, and 19 lines of text in Russian were added on pages 27 and 28 in the second edition.

American Esperantists should also know that an American named James Ruggles, of Cincinnati, published an elaborate "Universal Language" in 1829.

Come on, you old-timers! Let's get it into the record. Send information about our pioneers to Conrad Fisher, Route 1, Meadville, Pa., so that he can work up the history of the early days for *Review* readers. Or send articles, anecdotes, etc., about those early Esperantists directly to the *Review*.

YOU Can Help Make Esperanto History!

## Esperanto League for North America

is building an effective movement in North America for

**ESPERANTO NOW!**

We need your help

Join now

# Esperanto Vagabonds in Europe

*Second in a series of articles on the wanderings of the Doneis family (Peggy, 14, Pancho, 17, Peter, 8, and their parents, Mary and Armin — Esperantists all).*

**A**fter a glorious week in a truly international brotherhood in Wonderful Copenhagen at the 41st Universal Esperanto Congress, we directed our Volkswagen southward into Germany to visit Esperantists in Hamburg and Munster, whom we had met in Copenhagen, and who insisted on being our hosts. There we spent many enjoyable hours and admired the many new ultra-modern apartment houses and office buildings that had risen Phoenix-like out of those severely and extensively bombed cities. The energy and persistence of the people in these heavily damaged cities to rebuild in the face of fearful destruction must be seen to be properly appreciated.

Farther south, we reached the industrial Ruhr Valley, where mines and manufacturing plants had again miraculously but through great pains and effort been rebuilt out of the rubble and destruction. Here too, great determination, integrity and an indomitable spirit to survive were exemplified by the remarkable recovery and reconstruction. Again the thoroughness of the German artisans and their inventiveness have placed on the market many ingenious products and contrivances that find ready buyers all over Europe, because of the inherent honesty of their design and construction. We saw nothing shoddy or jerry-built coming from their factories.

In Cologne, which Armin had visited 28 years earlier and remembered as a beautiful gem of the Rhineland, we got a shock. We thought that we had become accustomed to seeing great expanses of military destruction in London, Rotterdam, Munich, Nurnberg and Bremen, but

we were not prepared for the utter devastation found in Cologne. Feverish building activity is prevalent in every section of the city and, as in every other large city visited, we found great scaffolds erected on all the sites of new buildings in various stages of erection. (In fact, each city has business enterprises which specialize in renting or leasing of scaffolding for these building sites.) But in Cologne, in spite of the tremendous effort of rebuilding, almost half of the city is still a huge rubble heap, with loose rubble that had fallen into the streets scooped up and dumped back into the gaping ruins.

Although Cologne Cathedral had not suffered direct bomb hits, it nevertheless suffered greatly and, although it has been made safe by reinforcement and rebuilding of damaged portions, we were told that an estimated 15 or 20 years will be required for complete restoration of war damages.

When we commented on the utter waste and futility of war, our friend who was guiding us remarked that the material damage to buildings and industries was only the surface manifestation of the true damage done by war. He told us that 14 orphanages had to be built in the vicinity of Cologne alone, to house and care for the children who had lost their homes and parents during the holocaust. His comment was that houses and industries can be rebuilt and replaced, but replacement of parents is impossible. He shuddered to think of the damning blighting effect of the past wars on the rising generation. These are, he assured us, the most alarming consequences of war; not the material destruction!



# Esperanto kaj Mallongaj Ondoj

de David Richardson

Kvankam la aŭskultado al la mallongaj ondoj ne estas plu ĝenerala en Norda Ameriko, kiel antaŭ pluraj jaroj, la mallongaj ondoj tamen havas apartan allogon por Esperantistoj pro la multaj bonaj programoj en Esperanto, kiujn oni povas aŭdi — eĉ en Norda Ameriko. Ĉar tre malmultaj samideanoj ĉi tie iam provis ricevi mallong-ondan programon, kaj el tiuj malmultaj nur kelkaj iam sukcesis, la celo de ĉi tiu artikolo estas doni praktikajn konsilojn al la hodiaŭa samideanaro amerika pri la arto “fiŝkapti” Esperanto-sendojn ĉe la mallong-onda radio.

Sed ĉu tio valoras la penon? Por serioza Esperantisto, la respondo estas senkondiĉe: jes. Kiam, antaŭ jaroj, mi estis juna kaj nova Esperantisto, mi ofte agordis la hejman ricevilon por aŭdi radio-amatorojn. Unu tagon, tute hazarde, mi agordis al signalo nekonata al mi kaj haltis pro surprizo, aŭdante paroladon en Esperanto! La plezuro kaj ekscito, kiujn mi sentis, estas tute nepriskribeblaj. Bedaŭrinde oni ĝuste en tiu minuto fermis la programon kaj ĉesis la sendon. Kvankam mi notis la horon kaj la frekvencon, mi neniam denove sukcesis ricevi tiun programon. En tiuj samaj semajnoj Eŭropo estis en la mezo de militoeksplozo, kaj mi ofte scivolis, ĉu mi eble ricevis la plej lastan Esperantan radio-voĉon ĝis la fino de la mondmilito.

En la pasintaj jaroj multaj eksterlandaj stacioj entreprenis sendi en Esperanto kaj mi sukcese ricevis programojn el Svislando, Svedujo, Francujo, kaj Nederlando. Amerikanoj, kiuj ĝenerale aŭdas Esperanton parolata nur de aliaj amerikanoj, tute certe profitos el la aŭskultado al iu ajn programo el eksterlando.

La listo de Esperanto-sendoj aperas en la diversaj gazetoj de nia movado, sed kiel ilin interpreti? Ili estas listigitaj laŭ “ondlongo”, t.e. en *metroj*, dum niaj riceviloj preskaŭ senescepte estas gradigitaj en “frekvenco”, do en *kilocikloj*. Do, la unua regulo: *por ricevi frekvencon en kilocikloj, dividi 300,000 per la ondlongo en metroj*. Se via aparato estas gradigita en *megacikloj*, dividi la frekvencon en kilocikloj per mil: 9536 kilocikloj egalas al 9.536 megacikloj.

La listoj de sendoj aperas laŭ diversaj hor-sistemoj en la diversaj gazetoj. Prefere estas uzi nur la listojn kiuj donas la horojn laŭ GMT (hor-sistemo de Greenwich), kiu estas la internacia sistemo. *Por ricevi “Eastern Standard Time” deprenu de GMT 5 horojn*: kaj ne forgesu ke multaj landoj uzas 24-horan sistemon, tiel ke 1115 signifas 11:15 AM, 1230 signifas 12:30 PM, 1345 signifas 1:45 PM, ktp.

Alia malfacilaĵo estas, ke multaj sendoj okazas per ondlongoj tute nekonvenaj por ricevo trans longa distanco, kaj la provo ricevi ilin estas malŝparo de tempo. Ĝenerale la ondoj pli longaj ol 75 metroj estas senutilaj trans longaj distancoj, krom sur la atlantika marbordo kie ili povas doni rezultojn ĝis 100 metroj aŭ pli.

Jen listo de la kurantaj Esperanto-sendoj, kun la horoj indikitaj laŭ “Eastern Standard Time” kaj la ondlongoj konvertitaj en la pli konvenan frekvenco-sistemon. Sendoj kiujn oni verŝajne ne sukcesus ricevi en Norda Ameriko ne estas listigitaj.

*Kion diras la tumultaj (mallongaj) ondoj?*  
**LERNU ESPERANTON!**

Vidu hortabelon sur paĝo 10.

# Hey, Teacher! Read this!

*(Excerpts from a report by Stellan Engholm to the Governing Board of Schools in Sweden)*

**T**HE BASIC TEACHING OF GRAMMAR. By request, I will add some information concerning my experience of the value of Esperanto for the basic teaching of grammar and for general education in language.

I found that Esperanto possesses unquestionable advantages as a help to the teaching of general grammar. Consequently, I think that grammar instruction in our schools would give considerably better results if at least one lesson each week were dedicated to teaching Esperanto./ In all schools of many countries, where Esperanto is taught, it has been found that the teaching of the mother tongue and Esperanto gave the students a much sounder knowledge of grammar and a better language sense than could be achieved by teaching the mother tongue alone. Especially noteworthy are the results in Britain, where students were taught Esperanto and French — but with the same total number of lessons — instead of being taught French alone. At the end of the experiment, it was found that those who first studied Esperanto had a better knowledge of French than those who studied only French. My own experience fully confirms this. The reason why Esperanto facilitates teaching of grammar and general education is found in the logical structure of Esperanto. Words and word parts support by their own form our logical division of the various elements of the language. This logical division is for children a quite abstract affair. Normally talented children usually easily understand grammar but, nevertheless, it does not become a natural reality. Compared to the concrete external world, the grammatical division of word elements and the relations between them seem like a fog of foreign incomprehensible words./ But Es-

peranto can vivify the grammatical elements. Thanks to the endings of Esperanto words, these words themselves appear as concretizations of the grammatical idea. The invariable rules, constant as the idea itself, as though a picture of the idea, concretize the idea in the Esperanto words, and not in thousands of various forms, such as the national languages present.

Esperanto also trains and strengthens the language sense. Every sentence formed in Esperanto must be the adequate expression of the thought or of the group of thoughts which one wants to transform into words. Essentially, this is so also in other languages, but in them the relation between the logical structure of the thought and the adequate logical structure of the sentence is often hidden by a mass of more or less illogical forms of expression which, little by little, have won approval as usable or even good.

On the other hand, in Esperanto there is only one, but an unailing, test as to whether the sentence is good; namely, that the word structure shall be an absolutely adequate expression of the thought. As the individual words illustrate and bring to life the grammatical ideas, so the sentence becomes a living picture of the thought, of the group of ideas. Thus is created in the student's mind a clear and firm concept of the relation between the thoughts and the word structures. The practically inexhaustible possibility of word-combination in Esperanto is particularly important for cultivation of the language sense.



## A Sample Lesson in Esperanto

**I**F YOU DOUBT THE VALIDITY of the argument (opposite page) for teaching children Esperanto as an introduction to the general study of language, this is for you.

Most Esperanto words consist of:

(1) the idea part, or root, and (2) a grammatical ending.

Nouns (name words) take the ending *o*. Adjectives (describing words) take the ending *a*. Verbs (action words) have four main forms: Infinitive (expressing no time relation) ends in *i*; present ends in *as*; past ends in *is*; future ends in *os*. Adverbs (words used to modify verbs, adjectives or other adverbs, and telling where, when, why, how or how much) end in *e*.

Any root may, by adding the proper grammatical ending, be used as a noun, adjective, verb or adverb.

For example: Using the root *san*, we may form the noun *sano* (health); the adjective *sana* (healthy); the infinitive *sani* (to be healthy); the present tense verb *sanas* (is, am, or are healthy); past tense verb *sanis* (was or were healthy); future tense verb *sanos* (will be healthy); or the adverb *sane* (healthily).

### WORD BUILDING

In English, two or more words sometimes are combined to form a new word.

Examples: Steam+ship; rail+way.

There are also prefixes and suffixes to add to basic words, to form new words of related meanings.

Examples: Beauty+fy—beautify; un+fit—unfit.

In English, however, word-building is not a normal, basic process. One cannot make new compounds at will, but must learn each one as a separate new word.

For example: Beauty+fy—beautify, but dignity+fy—not dignify, but dignity.

In Esperanto, word-building is a basic part of the normal process of expression. There are about 40 prefixes and suffixes, each with a definite significance. You may, and are expected to, combine these with word roots, word roots with word roots, or prefixes and suffixes with one another, in any way which expresses your idea—always being careful to add the proper grammatical ending to each word.

In reading Esperanto, when you meet a new word, analyze it: grammatical ending, prefixes, suffixes, word-roots.

For example, using the root *san* and the prefixes *mal-* (the opposite of) and *re-* (again), and the suffixes *-ul* (person characterized by), *-in* (feminine), *-ig* (cause to be or to do), *-ej* (place for), *-ig* (to become), *-ebl* (indicates possibility), translate the following words:

*malsana, malsanulo, malsanulino, mal-sanigis, resanigos, resanigejo, resanigebla.*

One might even, using the suffix *-ind* (worthy of), ask whether a certain *malsanulo* is *resaniginda*.

*Maybe he won't study his lessons!*

## Bonvolu Skribi

La *Revuo* presas senpage (sed foje mallongigas) korespondpetojn el aliaj landoj. Tiuj anoncoj aperas nur se, kaj kiam, konvenas al la redakcio (ĝis nun ni senprokraste presis ĉiujn, kies adresojn ni povis legi), kaj ili temu nur pri korespondado en *Esperanto*. Por certigi nepran aperon, oni pagu \$1 ĝis 4 paĝvastaj linioj. Se resendadreso ne estas legebla, ĝi estas nek presebla, nek presinda, do ne presota. SKRIBU KLARE!

MALLONGIGOJ: Dez., deziras; kor., korespondi; pk., poŝtkarto; bk., bildkarto; pm., poŝtmarko; gaz., gazeto; il., ilustrita.

Jun-Ichi Osumi, 3-3 Chitosecho Sumidaku, Tokio, Japanio. Temo: Usono kaj Japanio.

C.H. Yiu, c/o Yamanote-So, No. 3535 3-Chome, Mejiro-Machi, Toshima-Ku, Tokio, Japan. 32-jara, laboras en reklamagentejo, studis elektroteknikon en universitato. Kun gesamideanoj usonaj kaj kanadaj pri diversaj temoj, speciale pri stato de ĵurnaloj kaj gazetoj en tiuj landoj.

Kazimierz Badowski, L.S.C., Konarskiego 52 m 9, Krakow, Pollando. Dez. ricevi el ĉiuj landoj la plej lastajn il. fabrikatalogojn de trikfabrikaĵoj (ĉefe tiuj faritaj per "Elastic"-maŝinoj), nome: viraj, virinaj, infanaj (precipe suĉinfanaj) subvestoj kaj vestoj. Kompensas kostojn al la sendintoj laŭ iliaj deziroj, premios la plej belajn el la senditaj katalogkolektoj per valoraj kaj luksaj pollandaj esperantaj eldonaĵoj.

Kreitzer Robert, Brno 18-Štolcova 11, Ĉeĥoslovakio. Kolektanto de alumetetikedoj. Dez. adresojn de gesamideanoj kiuj same kolektas, aŭ de fabrikoj al kiuj li petskribu.

Esperanto-Filma Grupo, *Dom Na Kinoto*, strato Rakovska 108, Sofio, Bulgario. Pli ol dek filmlaboristoj esperantistaj dez. kor. pri profesiaj temoj, interŝanĝi filmrevuojn, artikolojn, reklamojn kaj profesiajn novaĵojn. Volonte gastigos filmproduktantojn en nia lando. Hristo Karaneŝev, filmdirektoro, dez. kor. pri kinematografio-filmaj novaĵoj, organizado de filmproduktado kaj aliaj profesiaj demandoj.

Petr Svebota, Ostrava-Vitkovice, Ocelarska 38, Ĉeĥoslovakio. Juna komencanto.

### ESPERANTO KAJ LA MALLONGAJ ONDOJ — HORTABELO

*Dimanĉo, Lundo:* Neniuj sendoj sur taŭgaj frekvencoj.

*Mardo:* 6:55—7:00 AM, Bern, 6163, 9536, 21590 kc.

12:35—12:40 PM, Ripeto de la samo.

12:55—1:10 PM, Roma, 5960, 7274, 9709 kc.

2:00—2:15 PM, Stockholm, 11494, 15075 kc. (Nur la lastan mardon de ĉiu monato)

*Merkredo:* 12:55—1:10 PM, Roma, same kiel marde.

4:55—5:05 PM, Vieno, 6155, 11783 kc.

*Ĵaŭdo:* 6:55—7:00 AM, Bern, kiel marde.

12:35—12:40 PM, Ripeto de la samo.

6:30—7:00 PM, Sao Paulo, 4775 kc.

*Vendredo:* 12:55—1:10 PM, Roma, kiel marde.

4:30—4:45 PM, Guatemala, 6383, 9836 kc.

*Sabato:* 12:30—1:00 PM, Rio de Janeiro. 9772, 11952 kc.

Lastan vorteton: Ricevinte disaŭdigon en Esperanto, ne forgesu skribi al la sendstacio! Adresoj de la stacioj estas troveblaj en la ĉefaj internaciaj Esperanto-gazetoj.

Bonan fiŝkapton!

## Local Addresses

Please address all inquiries concerning the national movement, requests for addresses not listed here, etc., to:  
Esperanto League for North America, Inc.  
Route 1, Meadville, Pennsylvania.

---

Esperanto-Klubo de Los Angeles:  
1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29,

Washington (D.C.) Esperanto Club:  
2829 Gainesville St., S.E., Wash. 20, D.C.  
Apt. 101

---

Esperanto-Societo de San Diego:  
P.O. Box 4367, San Diego 4, California.

Seattle Esperanto Society:  
3231 West 62nd St., Seattle 7, Wash.

George E. Wagner, 403 E. North St.,  
Tampa 4, Florida.

---

H. K. Ver Ploeg, 1908 East 8th Avenue,  
Spokane 32, Wash.

---

Esperanto in Buffalo:  
P.O. Box 222, Niagara Sta., Buffalo 1, N.Y.

---

Esperanto Coterie of Texas:  
P.O. Box 805, Houston 1, Texas.

---

Esperanto Club of Santa Monica:  
855 Franklin St., Santa Monica, Calif.

---

Jarvis E. Bush, 3700 North 75th St.,  
Milwaukee 16, Wisconsin.

---

Esperanto Society of Greater New York:  
767 United Nations Plaza, New York 1, NY

---

Esperanto Society of San Francisco:  
346 Staples Ave., San Francisco 12, Calif.

---

Centro por Kanadaj Esperantistoj:  
Box 52, Terminal A, Toronto, Kanado.

---

Christie W. Roberts, Rose Valley,  
Saskatchewan, Kanado.

---

Sacramento Esperanto Club, 450 45th St.,  
Sacramento 19, California.

---

LISTIGU VIAN GRUPON!

## DUMVIVAĴ MEMBROJ DE ELNA

Perry V. Eakin, Kansas City, Mo.  
Joseph Leahy, Watertown, N.Y.  
Van Allen Lyman, San Diego, Calif.  
Edward W. Pharo, Jr., Somerton, Pa.  
David B. Richardson, Tacoma, Wash.  
Lee Stern, Hornby, Ontario, Kanado

---

### PATRONOJ

Thomas A. Goldman, Pacific Palisades, Cal.  
John L. Lewine, New York, N. Y.  
Roan U. Orloff, Newton Centre, Mass.

---

### SUBTENANTOJ

Martin C. Baade, Elk Grove, Cal.  
Dr. Francis E. Ballard, Reseda, Cal.  
Roland Barta, Denver, Colo.  
Dirk M. Brink, San Diego, Cal.  
Jarvis E. Bush, Milwaukee, Wis.  
Ferdinand R. Carlson, Seattle, Wash.  
John E. Carpenter, Sacramento, Cal.  
A. Chmielewicz, Philadelphia, Pa.  
John F. Clewe, Los Angeles, Cal.  
Armin F. Doneis, Pharr, Texas  
Louis Dormont, Brooklyn, N.Y.  
A. J. Emery, Brooklyn, N.Y.  
George Falgier, St. Louis, Mo.  
John E. Falk, Pasadena, Cal.  
Conrad Fisher, Meadville, Pa.  
Dr. Howard French, Davidson, N. C.  
E. M. Gleason, Jr., Black Rock, Ark.  
Vincent A. Griffeth, Seattle, Wash.  
Adrian Hughes, Hillsboro, Ore.  
Joseph Karr, Chicago, Ill.  
Louis Kalus, St. Louis, Mo.  
Helen Larson, Seattle, Wash.  
R. C. Marble, Van Nuys, Cal.  
Fritz Mitschke, St. Petersburg, Fla.  
Ray Pease, Jersey City, N.J.  
Elwyn C. Pollock, El Cajon, Cal.  
Cecelia P. Thomas, Portland, Ore.  
Sino Wm. Topham, Jackson Heights, N.Y.  
A. A. Van Petten, Charleston, W. Va.  
Don W. Pittman, Logan, Utah

## ESPERANTO EN NORDA AMERIKO

*Adventure*, multe legata gazeto por viroj, komence per la numero de februaro, 1957, listigas Esperanton kiel unu el la sciencaj kaj teknikaj temoj por la rubriko "Ask Adventure Experts" (demandu al spertuloj de *Adventure*). La adreso donata por informpetoj estas tiu de Conrad Fisher, kiel sekretario de la Ligo. Estas interese ke, anstataŭ postuli pagon por reklami nin, oni pagos al li por respondi informpetojn de legantoj de *Adventure*.

*Everywoman's*, gazeto por virinoj, listigis en sia decembra numero Kristnaskajn salutojn el multaj landoj, kaj sugestis ke oni salutis siajn geamikojn per la lingvoj de ties prapatroj. Oni plue sugestis ke, taŭge por ĉiuj landoj kaj cirkonstancoj, oni uzu la universalan lingvon, Esperanto, kaj diru "Gajan Kristnaskon".

*The Rotarian*, por januaro, 1957, prezentis leteron pri Esperanto de Adrian Hughes.

*Tampa (Fla) Daily Times*, 14 januaro, 1957, prezentis duonkolonan artikolon pri Esperanto kaj pri la Esperanta korespondado de S-ano George Wagner.

SACRAMENTO, CAL. — La *Sacramento Esperanto Club* en decembro faris sonrubandon de kanto, Esperantaj vortoj laŭ muziko de "Getting to Know You" el "Reĝo kaj Mi". Eble estas interese, se aliaj kluboj farus simile kaj interŝanĝus rubandojn.

SAN DIEGO, CAL. — D-ro J. Scolnik kaj lia fratino, D-ino R. Scolnik, el Argentino, vizitis gesamideanojn en San Diego dum januaro. Ĝus reveninte el Hindujo kaj Tibeto, ili pluiris al Meksikio. Oni ne raportis ĉu ili renkontis esperantistojn en la aziaj landoj, sed espereble ili faros tion en Meksikio.

Kvar Esperantistoj el San Diego ĉeestos la Universalan Kongreson en Marseille.

WASHINGTON, D.C. — La kunvendato de la Esperanto-Klubo de Washington ŝanĝiĝis, kaj estos la 3a merkredo de la monato.

37 personoj ĉeestis, kaj ĝuis, la festan Zamenhof-bankedon.

Nova Esperanta klaso gvidata de S-ano Irvine komenciĝis je la 26a de novembro. El tiu klaso la klubo gajnis 14 novajn membrojn. Oni postulas ke ĉiu klasano aliĝu al la klubo kaj al UEA aŭ ELNA.

SANTA MONICA, CAL. — Letervespero de la klubo faris viglajn korespondemulojn el kelkaj geklubanoj. Oni arangis "parolan ĵurnalon", kiun tre ĝuis ĉiuj, precipe la partoprenantoj.

SPOKANE, WASH. — Krom kvin kursanoj kiuj konstante ĉeestas klasojn, du instruistoj de lingvoj en publikaj lernejoj venas unu- aŭ dufoje dum la monato, kaj S-ano Ver Ploeg private instruas unu instruiston kiu ne povas ĉeesti ĉar li instruas hispane dum la vesperoj de la Esperanta klaso.

LOS ANGELES, CAL. — Preskaŭ 70 ĉeestis la Zamenhofan feston. Inter la gastoj estis Ben Hunter de KFI "Night Owls" (Noktaj Strigoj) kaj lia edzino. S-ro Hunter, kiu prezentas radioprogramon por la nedormantoj de la noktomezo ĝis la kvina matene, alportis sonbendan maŝinon kaj intervjuis kelkajn gesamideanojn. Post du tagojn li disaŭdigis 40-minutan programon pri Esperanto. Rezulte venis pli ol kvindek informpetoj.

Lilio Chomette, denaska Esperantistino, revenis post longa vojaĝo tra multaj eŭropaj landoj.

PORT HUENEME, CAL. — Grupo de *Noktaj Strigoj*, aŭskultantoj de la programo de Ben Hunter, mendis 25 lernolibretojn kaj petis ke la Esperantistoj en Los Angeles sendu parolonton.

## INTERESAJ DIVERSAĴOJ

La kaso de ELNA dum la financa jaro ĝis 30 junio, 1956, pliĝis per \$307.17. Mi ne havas ĉemane raporton pri la lasta duono de 1956, sed kredas ke ĝi estis eĉ pli kontentiga.

Ĉu vi scias, ke *Esperanto League Book Service* pagas al ELNA 25% el mono ricevita pro libromendo? Dum 5 monatoj en 1956, ELNA tiel ricevis \$13.26. Aĉetu pli da libroj ĉe *ELNA Book Service*, kaj tiel helpu al la enspezoj de ELNA.

Kiu mendas librojn pogrande ĉe *ELNA Book Service* por revendi, ricevas 25% rabaton. Ĉiu grupo starigu propran libroservon, kaj uzu la 25%-an profiton por plivastigi la klubajn aktivojn.

Adrian Hughes dissendis 568 leterojn al geginstruistoj pri senpaga Esperanto-kurso.

UEA faras specialan kampanjon por distribui la novan 6-lingvan cirkuleron al delegitoj ĉe la *internaciaj* kongresoj kiuj okazos dum 1957 en Usono. Ĉefdelegito D. E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37, Calif., povas liveri bezonatajn kvantojn da tiuj cirkuleroj je la prezo fiksitita de UEA, \$1.15 por 100, aŭ 1¼¢ po unu ekzemplero.

S-ano Glenn Turner (*Esperanto League Book Service*) klopodas ke la televida\* programo "You Asked For It" invitu Pas-tron Cseh por prezenti Esperanton al la usona publiko, ĉar li povas instrui sen koni la lingvon de la aŭskultantoj. Eble, se sufiĉaj Esperantistoj "ask for it" (petos ĝin), oni prezentos tiun interesegan programon. Skribu multnombre al: You Asked For It, P.O. Box 323, Hollywood 28, California.

\*S-ano Goldman korektis mian uzadon de "televideo", dirante ke "televizio" estas multe pli internacia formo.

PORTU LA VERDAN STELON

## Executive Board Decisions

1. We retain the Board and Officers of the League until the 1957 Congress.

2. The 1957 Congress will convene in New York from July 4 thru July 7.

3. President John Lewine is in charge of the New York convention and will appoint a local congress committee, set fees, submit tentative program and do everything necessary to make this convention a success.

4. ELNA kaso will continue to allow \$100 towards each issue of the *Review*. The funds are to be disbursed by the editor, Ferd. Carlson, as he sees fit. A periodic examination by auditor Jay Berry requested.

5. We will use two dates for starting membership. Dues received after November 30 are effective as of January 1, and dues received after May 31 to be effective as of July 1.

6. The editor of the *Review* is authorized to publish material received from UEA concerning the organizational situation in the U. S. and related topics, but no additional comment be published without the express authorization of the estraro.

The nominating committee for the 1957 convention will be headed by Wm. Harmon. This committee consists of 5 members not officers of the League. They will nominate a list for the following offices:

3 board members who will serve for 2 years;

3 board members who will serve for 3 years;

The President (3 year term);

The Vice President (3 year term).

**PROponu KANDIDATOJN AL:**

**Wm. Harmon, 2271 Locust Ave.,  
Long Beach, California.**

# Trans la Lingvajn Barilojn

*Francis kaj Bonnie Helmuth, el San Diego, komencis lerni Esperanton en Aprilo, 1955. Post jaro kaj duono ili entreprenis unujaran vojaĝon tra Eŭropo, kaj raportas al ni.*

ROTTERDAM, NEDERLANDO, 18 OKT., 1956

Bonnie kaj mi devis elŝipiĝi en Antverpeno, Belgujo, ĉar la vaporŝipkompanio, Holland-Amerika, ne volis ke ni restu surŝipe. Ili pagis por biletoj al Rotterdam per vagonaro, kaj ni ne povis halti por kontakti la esperantistojn en Antverpeno. Estis bedaŭrinda afero, sed eble baldaŭ en la estonteco ni povos rehalti tie.

Pluvis dum la vagonara veturo al Rotterdam, kaj kiam ni atingis la urbon ankoraŭ estis pluvante. Ni trovis hotelĉambro apud la centra parto de la urbo, kiu kostis 12 guldenojn (proksimume \$3.15) kun matenmanĝo. La horo estis la tria, posttagmeze, kaj Bonnie estis tro laca por vagi tra la urbo, do ŝi enlitiĝis kaj mi iris al la centra parto de la urbo.

Oni povas trovi la oficejon de la Universala Esperanto-Asocio tre facile, ĉar ĝi estas sur la konata strato Eendrachtsweg. Estas bela kanalo en la centro de Eendrachtsweg, kaj ĉe ĉiu flanko estas larĝa herbejo kaj multaj belaj arboj. La vojoj iras laŭlonge de ĉi tiuj herbejoj kaj kanalo, kaj la oficejo estas lokita kie oni povas vidi la belajn parketon kaj kanalon de la oficejo.

Kiam mi iris apud la pordon de la oficejo mi vidis du montrofenestrojn ĉe la maldekstra flanko kaj mi haltis por vidi iliajn enhavojn. Estis ekspozicio de esperantaĵoj! Jen estis bonega afero, ĉar miloj da personoj piedpasas ĉi tiujn fenestrojn ĉiutage kaj multaj el ili devas vidi la propagandaĵojn pri Esperanto: libroj kaj libretoj, turistprospektoj, broŝuroj, ktp. Ankaŭ, sur la muro de la konstruaĵo estis la vortoj "Universala Esperanto-Asocio", kaj sur fenestro super la pordo estis granda

verda stelo.

Interne mi trovis malluman koridoron kun du pordoj ĉe ĝia maldekstra flanko. Kiam mi malfermis la unuan pordon mi vidis du virinojn kiuj laboris ĉe skribmaŝinoj. Ambaŭ portis verdajn stelojn, do mi diris, "Bonan tagon." Ili rigardis al mi kaj unu el ili respondis, "Saluton, sinjoro. Ĉu ni povas helpi vin?" Tiam mi prezentis min, kaj post taso da teo kaj kelkaj afablaj vortoj alia virino eniris. Ŝi estis fraŭlino Vermaas, kaj ŝi invitis min en sian oficejon por interparolo. Ni marŝis el la unua oficejo, tra ĉambro inter la du oficejoj, kie estis bretaroj kun multaj libroj, aĵoj por poŝto kaj oficejlaboro, ktp. Ĉi tio montris al mi, ke memevidente oni laboregas ĉe ĉi tiu oficejo por disvastigi librojn, gazetojn, reklamojn kaj informojn al la diversaj partoj de la mondo.

Fraŭlino Vermaas kaj mi babiladis dum horo kaj duono kaj ŝi diris ke ili ricevis mian leteron, kiun mi sendis el New Orleans, kaj ke ili havas leteron por mi de s-ro Dirk Brink en San Diego, Kalifornio. Ŝi diris ke s-ro J. T. de Goeij havas la leteron kaj kunportos ĝin kiam li alvenos je la kvina. Li estas fakdelegito pri policaj aferoj en Rotterdam kaj ankaŭ laboras ĉe la oficejo de UEA post siaj laborhoroj.

Kiam mi foriris el la oficejo de UEA mi havis bonan senton, ĉar mi jam trovis geamikojn per la verda stelo, kvankam mi estis en fremda lando, kie oni parolas alian lingvon. Ili invitis min kaj mian edzinon al la oficejo por pli da interparolo dum la venontaj tagoj, kaj ankaŭ diris ke, se ni bezonos helpon pri ia afero, ili ŝatus helpi nin.

*(Daŭrigota en venontaj numeroj)*



S-ano Roland Barta en Denver sciigas pri

## Morto de Pioniro

Mortis la 27an de Decembro nia kamarado kaj samideano J. M. Kerr je la aĝo de 90 jaroj. Dum jaro kaj duono li estis en speco de hospitalo, ripoz-hejmo, kie ĉiu atendis lian morton. Mi kredas ke tiu tuta tempo estis tempo de suferado.

K-do Kerr estis unu el la plej malnovaj Esperantaj pioniroj en Usono. Li Esperantistiĝis ĉirkaŭ la jaro 1904 aŭ 1905. Li loĝis dum ĉirkaŭ dek jaroj en Meksikio sub la reĝimo de la diktatoro Diaz, kaj K-do Kerr multe propagandis Esperanton tie, do mi kredas ke li estis ankaŭ pioniro de Esperanto en Meksikio. Kerr loĝis en Meksikio ĝis la eksplodo de la revolucio sub la gvido de Madero kaj en tiu revolucio Kerr, kune kun aliaj IWW-anoj, helpis al ĝi. Kerr rakontis al mi ke li mem faris la unuan ruĝan flagon, kiu estis uzata en tiu revolucio. Kaj poste, senĉese, li ĉiam propagandis Esperanton, tiel ke en Denver li estis konata kiel la simbolo de Esperanto. Dum sia tuta vivo li estis ĝisosta Esperantisto. Krome li korespondadis foje foje kun Lanti mem.

### ATENTU, KORESPONDEMULOJ!

*Aftonbladet*, la plej granda vesperĵurnalo en Svedujo, publikigas senpage korespondetojn de eksterlandaj korespondemuloj. Jen oportuno, se vi deziras korespondi kun svedoj, por montri al la ekstera mondo la vastan uzadon de Esperanto en internacia korespondado. Sendu petojn al:

Ett ögonblick redaktörn, *Aftonbladet*, Vattuggatan 12, Stockholm 1, Svedujo.

### BONVOLU SKRIBI

F-ino Lea Bočkova, Brno, Kamenna 9a, ĈSR. Dez. kor. kun usonanoj.  
Eduard Urbanec, Varazdin, Krizaniceva 40, Jugoslavio. Kun usonanoj.



## OR RIMISTOJ

(POETOJ NE LEGU !)

---

### AŬSKULTU, AMIKETOJ

La sekundo elpezita por veturi sendanĝere  
Kredeble ŝparos tagojn — kaj lernu ĝin parkere —  
Por pliigi vian vivon ĝis la aĝo pli maljuna,  
Kaj eviti multajn larmojn iafoje ek de nuna.  
La Aŭto, vi komprenas, estas aĵo de la belo,  
Oportuna kaj komforta funkciante laŭ la celo.  
Sed la cerbo de la Aŭto sidas ja sub homa ĉapo,  
Tial agu vi plej zorge sen perdo de la kapo.  
Se vi devas piediri laŭ la strato okupata,  
Transiru nur post kiam vi igos ĝin konata  
Per serĉrigardo zorga, kiu montras, ke la vojo  
Dum momento liberiĝas de ĉio — eĉ hundbojo.  
Ĉar sciu, amiketoj, por dissemi tra la mondo  
Vian belan Esperanton, vi devas en la rondo  
De vivantoj resti longe, estante vigle sana;  
Kaj sane vigle varbu por la lingvo dekstromana.

*Sardelo*

---

### POST LA KRIZO

Venteto susuris,  
La fajro kuris  
Super kandeloj.  
Ĉe la ŝtuparo  
De la altaro,  
Apud la reloj,  
Fidplena kuraĝo  
Sur la vizaĝo —  
Juna virino :  
Ĉar fileto ne mortis,  
Al Di' dankon portis  
Preĝanta patrino.  
*Videjbro*

---

*Jen du novaj Rimistoj de la Revuo. Ni salutu ilin kamarade. Mi iom timas pri "Videjbro", ĉar ĉu diris al mi ke li estas poeto, anstataŭ rimisto. Sed, se li sincere pentas kaj volas esti rimisto, ni pardonu pasintajn pekojn. La Ĉefrimisto.*

## Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

### THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in *hats*, *ĉ* as *ch* in *church*, *g* as in *go*, *ĝ* as *g* in *gem*, *ĥ* as *ch* in *loch*, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in *azure*, *s* as in *so*, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

### THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple, *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *si*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

*-us*; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those which the majority of languages have taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.

**worth repeating...**



The World  
Needs  
ESPERANTO  
NOW

"No army can withstand the strength  
of an idea whose time has come"

--Victor Hugo

---

The great worldwide organization to promote Esperanto  
for people of all nations, all religions, all political beliefs  
IS



**Universala Esperanto-Asocio**

---

*The ONLY North American organization affiliated with UEA is*  
**Esperanto League *for* North America**

*Every member of the League is a member of UEA*

Why not Join Us Now?